


SEK-Bulteno



Nº 31; 2011 [2]

Boletín Informativo del “Saenzpenja Esperanto-Klubo”

Publicación bilingüe fundada en noviembre de 1990 con el objetivo de informar sobre las actividades locales, nacionales e internacionales relacionadas con la lengua internacional esperanto.



Sede social de la “Unión Checoslovaca” - Sidejo de Ĉeĥoslovaka Unio

Nia urbo

Kolektivecoj ĉeĥa kaj slovaka

Informo: sur p. 2

Agado de la Ĉeĥoslovaka Unio

Laŭ informoj de
Juanita Calaba de Schafheutle

Pli ol 15 diversaj kolektivecoj estis la enmigrintoj de Chaco.

Nia urbo *Pres. Roque Sáenz Peña*, (la dua pli grava en la provinco *Chaco*), estis fondita la 1-an de marto 1912.

Hispanoj, italoj kaj pluraj aliaj eŭropdevenaj enmigrintaj grupoj estis ĝiaj kunfondintoj.

Inter ili oni devas rimarki la ĉeĥojn kaj slovakojn, kiuj ekde tiu komenco multe kontribuis al nia regiono. Agrokulturistoj, instruistoj kaj pluraj aliaj profesiuloj helpis atingi la nunan kreskantan progreson.

La alveno de ĉeĥoj kaj slovakoj komencis en la jaro 1913, (oni memoru ke tiutempe ekzistis Respubliko Ĉeĥoslovakio), kaj tiam ili fondis *Ĉeĥoslovakian Union*, en la jaro 1966. Krome en nia urbo la ĉeĥoslovakoj ankaŭ fondis *Cooperativa Agropecuaria La Unión, Sociedad Slavia, Unión Gimnástica Sokol* kaj *Club Deportivo Morava*.

La Ĉeĥoslovaka Unio havas sian propran sidejon ĉe la strato "*Malvinas Argentinas*" (Avenuo n-ro 28 inter strato 19 kaj 21). Tiu sidejo komencis kiel lernejo en la jaro 1938 kaj ĝi samtempe estis loĝejo por la gefiloj de la ĉeĥoslovakaj kamparanoj. Nun la sidejo estas tre grava loko por la urbo, ne nur por la agado de la ĉeĥoj kaj slovakoj sed ankaŭ por iu ajn urbanoj kiuj luas la sidejon por okazigo de festoj, religiaj kongresoj, datrevenaj festoj, ktp. Dank' al la helpo de diversaj aŭtoritatuloj el Ĉeĥio kaj Slovakio la sidejo estis plene renovigita.



En la sidejo oni kreis Historian Muzeon pri la Urbo. Krome ĉe la avenuo n-ro 2 estis starigita "*Paseo de las Repúblicas Checa y Eslovaca*" kun ĉeĥa kaj slovakaj monumentoj omaĝe al Tomas Mazaryk kaj Ratislav Stefanik. (*Vidu supran foton*).

Inter la pli gravaj lastatempaj aktivadoj ni devas menci:

Instruadon de la ĉeĥa lingvo, lernadon de folkloraj dancoj ĉe la Baletto "Moravanka", aktivadon de teatra kaj korusa grupoj.

Historie, en la jardeko 1938, prof. Milos Brunclink instruis la ĉeĥan lingvon kaj ekinstruis Esperanton unuafoje en la urbo.

En la lastaj tempoj la asocio ricevis plurajn gravajn vizitojn: Profesorojn de ĉeĥa lingvo, registarajn funkciulojn kaj plilaste, la viziton de la 40-membra folkloro baletto "Slnka" el Slovakio.

SEK-Bulteno regule estas donita kiel arĥivo por la Ĉeĥo-Slovaka Muzeo.

Actualidad del Esperanto

La más universal de las lenguas vive una segunda juventud gracias a las nuevas vías que le ha abierto Internet.

El Esperanto es ya el vigésimo idioma del mundo más usado en Internet. La utopía de una lengua en común renace de sus cenizas gracias a las redes sociales.

28-03-2011
BORJA OLAIZOLA

Algunas dotes premonitorias debía de tener el padre de George Soros cuando decidió que la amenaza nazi en Hungría aconsejaba que su familia se despidiese del apellido Schwartz. El término Soros, que en esperanto significa 'subirá', se ajustaba como anillo al dedo al futuro que le esperaba a su hijo. Pero el apellido no fue lo único que heredó el que luego se convertiría en uno de los más famosos financieros de la historia. El abogado de origen judío Tivadar Soros hizo de George uno de los pocos hablantes nativos del esperanto, ese idioma llamado a convertirse en vehículo de comunicación universal inventado en 1887 por un oftalmólogo idealista -Lázaro Zamenhof- que había ido a nacer en una Polonia ocupada por la Rusia de los zares.

El padre de Soros pertenecía a una generación que vio la luz cuando todavía había sitio para la utopía. Nadie barruntaba aún los horrores que traería el

nuevo siglo y la llamada a la fraternidad universal a través del idioma común lanzada por el oculista polaco tuvo un extraordinario eco. En apenas dos décadas el mundo se llenó de asociaciones de esperantistas que se entusiasmaban ante la perspectiva de derribar la Torre de Babel de la incomprensión idiomática y se intercambiaban con frenesí cartas en las que proclamaban la hermandad y la solidaridad entre todos los hombres y razas.

La semilla prendió con fuerza también en España. En 1909 Barcelona acogía el V Congreso Universal del Esperanto y Alfonso XIII distinguía al artífice del nuevo idioma con el título de Comendador de la Orden de Isabel la Católica. Ese mismo año veía la luz el grupo esperantista de Chestre, población que con el tiempo se convertiría en la capital española de la nueva lengua. “Todo empezó por curiosidad”, cuenta José Manzanera, uno de los integrantes de la ya centenaria asociación. “Un agricultor que se llamaba Francisco Máñez y que era muy inquieto aprendió de forma autodidacta el esperanto y empezó a cartearse con esperantistas de todo el mundo. Llevaba las respuestas al casino y allí se entretenía leyéndolas ante todos. Había cartas de médicos de Londres, abogados de Múnich o Praga, actores húngaros, periodistas brasileños... A los demás vecinos aquello les pareció tan fascinante que terminaron pidiéndole a Máñez que les enseñase el nuevo idioma”.

Pero la llama no solo prendió en Chestre. Los ateneos esperantistas brotaron con energía en toda la geografía ibérica. Montse Piñeiro, directora del Museo del Esperanto de Subirats, el único que hay en España, recuerda que en la época previa a la II República en

Barcelona llegó a haber hasta 40 cursos activos para el aprendizaje de la nueva lengua. “La verdad es que en el mundo que conocemos hoy es difícil hacerse una idea de lo que entonces representó el esperanto y los ideales de solidaridad y fraternidad que llevaba asociados”, reflexiona. Los totalitarismos -el esperanto estuvo en el punto de mira de Hitler y Stalin- y las contiendas que asolaron Europa dejaron seriamente tocado el movimiento. En España, donde el franquismo hizo la vista gorda, la llama del esperantismo se mantuvo gracias a la labor del medio centenar de asociaciones repartidas por todo el territorio.

'Lingua franca'

El esperantismo, hasta hace poco encorsetado en los estrechos límites de las asociaciones, ha encontrado en Internet una segunda vida. “A veces me da la impresión de que la red se inventó para el esperanto”, dice Del Barrio, que tiene un blog trilingüe (esperanto, castellano e inglés) y está en permanente contacto a través del correo electrónico y las redes sociales con esperantistas de todo el mundo. “Me enteré del atentado del aeropuerto de Moscú del 24 de enero antes de que llegasen los primeros flashes informativos porque un colega esperantista ruso que estaba allí me lo contó y me mandó una foto”, explica.

La red, como el esperanto, no sabe de fronteras y ha dado alas a la propagación de un idioma que tiene mucho de virtual en la medida en que carece también de territorio y jerarquías. “Antes solo tenía arraigo en unos pocos países desarrollados mientras que ahora se puede aprender desde todos los rincones del mundo”, se felicita Del Barrio.

Desde 2004 funciona un curso en línea, **lernu.net**, que registra miles de visitas semanales y cuenta con más de 100.000 inscritos.

También hay redes sociales donde el esperanto tiene sus propios canales - Ipernity es la principal- aunque el idioma se desenvuelve ya por el espacio virtual sin necesidad de tuteladas (es una de las lenguas de *Google*). Del Barrio estima que, a la luz de los documentos redactados en esperanto, el idioma de Zamenhof sería ya el vigésimo más usado en Internet, todo un logro teniendo en cuenta que no tiene rango oficial en territorio alguno. “No hay otra lengua de las 6.000 que se hablan en el mundo que haya progresado de esa forma partiendo de cero”, proclama el esperantista.

Gramática

La gramática es de tipo indoeuropeo, y no difiere demasiado de la propia del español. Lo que más la define es el uso de finales propios para cada categoría gramatical:

O. Sustantivo.

A. Adjetivo.

E. Adverbio.

I. Verbo (infinitivo).

Ello permite formar distintas palabras a partir de una sola raíz, de forma regular. Por ejemplo, de la raíz *amik-* (amigo), se puede obtener directamente:

Amiko. Amigo.

Amika. Amistoso.

Amike. Amistosamente.

Amiki. Ser amigo.



Diario Sur.es (España)

Rodolfo G. Calógero (1923-2011)

El 15 de febrero de 2011, en Neuquén, a la edad de 88 años, falleció Rodolfo G. Calógero, esperantista como su padre y su abuelo. (RoSar)

Nació en Rosario el 19 de septiembre de 1923 y se hizo esperantista a los 14 años, en 1937, con la ayuda de su padre y por medio del *Koresponda Kurso* de AEA. Así en 1941, con 18 años, participó en el Primer Congreso Argentino de Esperanto y fue cofundador de AEL, *Argentina E-Ligo*.

En Rosario fue miembro de la asociación local y colaborador del Prof. Wilfred M. Goodes con quien rindió su examen para ser instructor de AEL.

Conoció a esperantistas como Tibor Sekelj y Lanti, en su paso por Argentina.

Por su profesión como funcionario del gobierno en la administración carcelaria, residió en Buenos Aires y finalmente en Neuquén, en la Patagonia Argentina. Miembro de UEA, de SAT, de la *Societo Zamenhof* y patrono de TEJO, Calógero ha sido un activo esperantista durante setenta años. En Argentina ha ocupado varias veces todos los cargos

en AEL y otras organizaciones esperantistas. Calculaba que a lo largo de su vida había dado más de doscientos cursos de esperanto, colaborando además y participando en todos los congresos nacionales de Esperanto.



Rodolfo G. Calógero (2007)

En 1980 estuvo entre los participantes y organizadores del 2° TAKE, "*Tut-Amerika Kongreso de Esperanto*" en la ciudad de San Luis.

Pudo además viajar a numerosos congresos esperantistas de Brasil, de UEA y de SAT, representando a la Argentina.

Su Biblioteca personal esperantista de más de mil volúmenes ha sido

donada para formar parte de la Biblioteca Pública de la ciudad de Neuquén. Fundó la "Asociación de Esperanto del Comahue", hoy desaparecida y promovió la creación de BER (Bariloche E-Rondo), en Bariloche. Hasta hace pocos años fue Delegado Principal de UEA en Argentina y acostumbraba financiar por su cuenta a miembros de UEA y TEJO, que no pudieran pagar. Bastaba pedirselo.

Retirado en casa de su hijo, por problemas de salud, todavía para el reciente año nuevo, recibió saludos de los que fueron sus discípulos o amigos personales que lo recordaban.

EL PRINCIPIO NARCISO

¿Cuándo ser feliz?

(Anónimo)



Mi hija me había telefonado varias veces, para decirme: “Mamá, tienes que venir a ver los narcisos antes de que se acaben.” Yo deseaba ir, pero era un camino de dos horas desde Laguna hasta Lake Arrowhead. “Iré este martes”, le prometí con cierta renuencia, cuando llamó por tercera vez.

El martes amaneció frío y lluvioso. Sin embargo, había yo prometido, y manejé hasta allá a regañadientes. Cuando finalmente entré a la casa de Carolina, los gozosos sonidos de niños felices me dieron la bienvenida. Encantada, abracé y saludé a mis nietos.

“¡Olvida los narcisos, Carolina! ¡El camino está invisible con estas nubes y esta niebla, y no hay nada en este mundo, excepto tú y estos pequeños, que yo desee ver tanto como para manejar una pulgada más!”

Mi hija sonrió calmadamente y dijo: “Nosotros manejamos en estas condiciones todo el tiempo, Mamá.” “Bueno”, le aseguré, “no me harás volver al camino sino hasta que aclare, y entonces ¡será para encaminarme a mi casa!”

“Pero, primero, vamos a ver los narcisos. Son sólo unas pocas cuerdas,” dijo Carolina. “Yo manejaré, estoy acostumbrada a esto.”

“Carolina”, dije firmemente, “por favor.”

“No te preocupes, Mamá, todo está bien, te lo aseguro. Nunca te perdonarías haberte perdido esta experiencia.”

Después de unos veinte minutos, doblamos a un angosto camino de grava y vimos un pequeño templo. Al otro lado del templo, vi un letrero hecho a mano, con una flecha, que decía: “Jardín de Narcisos.”

Salimos del carro, cada una tomó a un pequeño de la mano, y yo seguí a Carolina por el sendero. Entonces, al doblar una curva, miré y quedé boquiabierta. Delante de mí estaba la vista más gloriosa. Parecía como si alguien hubiera tomado una enorme tina de oro y la hubiera derramado sobre la cumbre del monte y sus laderas. Las flores estaban plantadas en majestuosos diseños arremolinados, grandes fajas y tiras de un anaranjado intenso, blanco cremoso, amarillo cetrino, salmón rosa, azafranado y amarillo mantequilla.

Cada variedad de diferente color estaba plantada en grandes grupos, de tal manera que se arremolinaban y ondulaban como un solo río, con su propio y único matiz. Había cinco acres de flores, unas dos hectáreas y media.

“¿Quién hizo esto?”, le pregunté a Carolina.

“Una mujer nada más”, me respondió Carolina. “Ella vive en este terreno. Ésa es su casa.” Carolina señaló una casa bien cuidada con una estructura en A, pequeña y modestamente asentada en medio de toda esa gloria. Caminamos hasta la casa.

En el patio, vimos un letrero. “Respuestas a las Preguntas que Yo Sé que Estás Haciendo”, decía el encabezado. La primera respuesta era una sencilla: “50.000 bulbos.” La segunda respuesta era: “Uno a la vez, por una mujer. Dos manos, dos pies y un cerebro.” La tercera respuesta era: “Comenzó en 1958.”

Para mí, ese momento fue una experiencia-que-cambia-la-vida. Pensé en esta mujer a quien nunca había conocido, quien, hacía más de cuarenta años había empezado a traer, un bulbo cada vez, su visión de belleza y gozo a una obscura cima de un monte. Plantando un bulbo cada vez, año tras año, esta mujer desconocida había cambiado para siempre el mundo en que vivía. Un día cada vez, ella había creado algo de extraordinaria magnificencia, belleza e inspiración. El principio que su Jardín de Narcisos enseñó es uno de los grandes principios para celebrar.

Esto es, aprender a movernos hacia nuestras metas y deseos un paso cada vez -a menudo tan sólo un paso de bebé cada vez- y aprender a amar el hacer, aprender a usar la acumulación de tiempo. Cuando multiplicamos minúsculos espacios de tiempo con pequeños incrementos de esfuerzo diario, encontraremos que podemos realizar cosas magníficas. Podemos cambiar el mundo...

“Me pone triste, en cierto modo”, admití a Carolina. “¿Qué hubiese yo logrado si yo hubiese pensado en una meta maravillosa hace unos treinta y cinco o cuarenta años, y hubiese yo trabajado esa meta ‘un bulbo cada vez’ a través de todos esos años? ¡Nada más piensa en lo que yo hubiera realizado!”

Mi hija resumió el mensaje del día en su manera directa usual: “Empieza mañana”, dijo. Ella estaba en lo cierto. Es tan sin sentido pensar en las horas perdidas del ayer. La manera de hacer el aprendizaje una lección de fiesta en vez de una causa de pesar es preguntar nada más: “¿Cómo puedo usar esto hoy?”

Usa el Principio Narciso. No esperes...
Hasta que tu auto o tu casa estén pagados.
Hasta que consigas un nuevo auto o casa.
Hasta que termines la escuela.
Hasta que regreses a la escuela.
Hasta que limpies tu casa.
Hasta que organices tu cochera.
Hasta que limpies tu escritorio.
Hasta que bajes cinco kilos.
Hasta que subas cinco kilos.
Hasta que te cases.

La felicidad es un viaje, no un destino.
Así, trabaja como si no necesitaras dinero.
Ama como si nunca hubieras sido lastimado.
Danza como si nadie te estuviera mirando.
No hay mejor tiempo que ahora para ser feliz.
Te deseo un día precioso, un día narciso.

¡No tengas miedo de que tu vida termine, ten miedo de que no comience!.



Niaj kunvenoj kaj vizitantoj

Saenzpenja Esperanto-Klubo ofte ricevas vizitantojn el diversaj mondpartoj... kaj dank' al *Pasporta Servo* oni gastigas ilin ĉe domo de esperantistoj. Jen kelkaj fotografioj de niaj kunvenoj kun ili.



*Koreanoj Roza kaj KaraAn antaŭ monumento de Carlos Gardel.
Nokta renkontiĝo kun Roza kaj KaraAn ĉe urbocentra restoracio.*

*Brazilano Cesar
Dorneles
Soares
vizitis la
placon
Esperanto
kiu montris
tiumomente
panelon
damaĝita
fare de
anonimaj
banditoj.
(Januaro 2011)*



*Kunfratiga
renkontiĝo
ĉe Intituto
Ce. Cu. Id.
«Jorge Amado».
(Januaro 2011)*



*Kunfratiga
renkontiĝo
ĉe urbocentra
restoracio
dum vizito de
Luiz Portella.
(Aprilo 2011)*



Interesaj konsideroj en Esperanto

Artikolo de **SEK-Bulteno n-ro 30** reeldonita

*Saluton estimataj geesperantistoj:
Ĉu vi ŝatas legi citaĵojn?
Jen kelkaj.*

La granda malico de iuj ofte baziĝas sur la stulteco de la aliaj. *Henri Maret.*

Tranĉeoj el ideoj valoras pli ol tranĉeoj el ŝtonoj. *José Martí.*

La vortoj de saĝuloj, trankvile aŭskultitaj, estas pli bonaj ol la kriadado de reganto inter malsaĝuloj. *Ecclésiastes.*

La plej malbonaj trompoj estas la propraj timoj. *Rudyard Kipling.*

Oni pli atingas per tenereco ol per perforto. *Jean de la Fontaine.*

Kiu malhavas humursenton ne estas feliĉa kaj feliĉigas nenium. *Saul Sansierra.*


Pli facile estas kritiki ol fari. *Anonima.*

Pluv-vespero aŭtuna. La vento maltrankvilas. Rigardante la balanciĝon de la branĉoj, miras mi pro la grandeco de la etaj aĵoj. *Tagore.*

--

Koncerne la feliĉon:

Nur bonfarado konsistigas feliĉon. *Aristóteles.*



Feliĉa estas tiu kiu, estante reĝo aŭ kamparano, sukcesas trovi pacon en sia hejmo. *Goethe.*

Por mi feliĉo konsistas en plena bonfarto, sentima dormo kaj senangora vekiĝo. *Françoise Sagan.*

Ne fari kion ni ŝatas igas nin feliĉaj, sed ŝati kion ni faras. *León Tolstoj.*

Multaj homoj maltrafas la etajn ĝuojn atendente la grandan feliĉon. *Pearl Buck.*

Feliĉo estas kiel papilio: ju pli vi postkuras ĝin, des pli ĝi forfuĝas. Sed se vi zorgos pri alio, ĝi plej fideme venos ripozi sur via ŝultro. *Viktor Frankl.*

Mi kore deziras, ke vi ŝatos ĉi tiujn frazojn. Amike,

Carlos Alberto Zubin
Buenos Aires

NdlR: Ni dankas al Pedro Aguilar Solá (IT), kiu bonvole helpis por ĉi tiu artikolo.

Belarta angulo

Jen alia poemo de nia najbarino kaj poetino Angela Siwinski dediĉita al alia fama verkistino kaj instruistino Alfonsina Storni.

Via Poezio

La marinaj ventoj
susuris sonĝojn,
lulante en via
mar' amato,
ondoj estis lulilo.

Inter la bukcenoj
kaj la maraj floroj
refloŝis eble
via avida junaĝo.

Kun osciloj kaj brizoj
povis percepti
Alfonsina
via poezio
emociegas
sen tempo
sen urĝo.



Angela Siwinski
Tradukis Esperanten: Alvalo

Tu Poesia


Los vientos marinos
susurraron sueños,
meciéndote en tu
mar amado,
las olas fueron cuna.

Entre caracoles
y flores marinas,
quizá reflató
tu juventud añorada.

Con vaivenes y brisas
habrás sentido
Alfonsina
que tu poesía
conmueve,
sin tiempo,
sin prisa.

Angela Siwinski

ESPERANTO



Una lengua transnacional, con una cultura universal
¡Visite www.lernu.net y aprenda esperanto!

Mallongaj novaĵoj

Esperanto kaj terapio

Terapio estas la arto kuraci, aŭ difinita kuracmetodo. Ĝi estas rimedo por atingi reekvilibron de la sano, aŭ por superi malsanon, fizikan aŭ spiritan.

Ekzistas diversaj tipoj de terapioj: lumo- aŭ fototerapio, fito- aŭ planto-terapio; fizikoterapio (per varmo, frido, ripozo, masaĝo, gimnastiko, ktp)

Tre utila estas la okupoterapio: pentrado, desegnado, muziko, lernado de fremdaj lingvoj kaj aliaj.

En tiaj cirkunstancoj estas tre taŭga lerni Esperanton.

La 20-an de oktobro 2010 finiĝis, kun plena sukceso, la 12-a Baza Esperanto-kurso, okazinta dun 6 monatoj en la urbo Volta Redonda (RJ) Brazilo. La kurso disvolviĝis en la bela sidejo de Centro de Malsanprevento por maljunuloj. En tiu asocio oni konsideras ke la lernado de Esperanto estas valora helpo por ekzerci la menson kaj aktivigi neŭronojn, kaj ankaŭ utila okupa terapio por la konservado de la korpa kaj de la anima sano. (*Esperanto n-ro 1246, aprilo 2011*)

Esperanto en La Plata

Plezure ni anoncas ke oni sukcesis kreadi Esperantan katedron en la Universitato de La Plata (Bonaero-Argentino).

La inaŭguro de la Katedro "Esperanto kaj sia kulturo" okazis vendrede la 18-an de marto 2011 en la salonoj de la Rektorejo, strato 7-a inter 47-48-aj je 18:30 horo.

La sekvanta semajno komencis kurson elementan en la Lernejo *Albert Thomas*, la teknika pli malnova kaj grava je la urbo.

Edgardo Chacon:

edgardomuseo@yahoo.com.ar

Javier Valli: izatasun@gmail.com

Vizito tra Sudameriko

Petra Smideliusz, 25-jara hungarino ĵus diplomiĝis kiel instruistino pri la angla kaj hispana lingvo en la prestiĝa universitato Eötvös Loránd de Budapeŝto. De marto ĝis majo 2011 Petra entreprenis vojaĝon al Sudameriko. Krom Brazilo kaj Ĉilio ŝi tuŝis ankaŭ nian landon, Argentinon.

Sed Petra estas ankaŭ esperantisto. Efektive, jam dum sia 14-a vivojaro ŝi partoprenis la famajn E-kursojn en la Ŝtata Universitato de San-Francisko, Usono - kie, kvazaŭ aŭgure pri sia estonta fako, ŝi konatiĝis kun nia Silvia Rottenberg. Krome, ŝi estas filino de la konata E-pedagogo Katalin Kováts, la "patrino" de **edukado.net**, **lernu.net** kaj la plej prestiĝaj E-ekzamenoj ekzistantaj, nome la KER-ekzamenoj. Ĉial do dum sia vojaĝo tra Sudameriko, Petra pozitive kontribuis al la E-movado jen per instruado, prelegoj aŭ alie. (*F. Veuthey*)

Universala Kongreso

La 96-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Kopenhago, Danio, de la 23-a ĝis la 30-a de julio 2011. La temo de la Kongreso estos: "Dialogoj kaj interkompreno".

kongreso@co.uea.org

www.uea.org/kongresoj/uk_2011.html

TAKE

La 8-a Tutamerika Kongreso de Esperanto okazos en Sao Paulo, Brazilo, la 9-an / 14-an de julio 2011. Samtempe kaj samloke okazos la 46-a Brazila Kongreso (BEL) kaj la 31-a Kongreso de Brazila Esperantista Junulara Organizo (BEJO)

www.easp.org/kongreso

TEJO

La 67-a Internacia Junulara Kongreso okazos en Kievo, Ukrainio.

www.ijk-67.retejo.info/

La estraro de UEA kunsidis en Roterdamo

Ekde sia elekto en Havano la Estraro de UEA praktike konstante kunsidas rete, sed la unuan realan kunsidon en la Centra Oficejo ĝi havis de la 15-a ĝis la 17-a de aprilo. Tuttempe partoprenis prezidanto Probal Dasgupta, vicprezidanto Claude Nourmont, ĝenerala sekretario Barbara Pietrzak kaj estraranoj Loes Demmendaal, Maritza Gutiérrez kaj Stefano Keller. Pro aliaj sindevontigoj Amri Wandel ne ĉeestis en la lasta tago. Ĝenerala direktoro Osmo Buller povis ĉeesti pro malsano nur mallonge en du tagoj. Lin anstataŭis oficisto Pasquale Zapelli, kiu partoprenis tuttempe, same kiel redaktoro Stano Marček. La prezidanto de ILEI Stefan MacGill ĉeestis la tutan unuan tagon, dum la volontulo de TEJO Manuela Ronco kaj la oficistoj de la Kongresa Fakoj Clay Magalhães kaj Tobiasz Kaźmierski ĉeestis dum la traktado de iliaj laborkampoj. Dum la pasintaj monatoj la Estraro faris jam multajn decidojn rete. Tiun eblecon ricevos ankaŭ la Komitato, kiu tiucele ricevos en Kopenhago proponon pri ŝanĝo en la Komitata Regularo. Jam pli frue la Estraro aprobos novan dokumenton pri la gvidlinioj por la redaktado de la revuo "Esperanto". Ĝian malneton ĝi jam prezentis al la Komitato por komentoj, kiujn oni laŭeble konsideros en la fina versio. Poste la Estraro proponos novan kontrakton al la nuna redaktoro de la revuo.

La Estraro ricevis raporton pri la laboro de la Komisiono pri Strategiaj Demandoj, kiu diskutas pri radikalaj ŝanĝoj en la strukturo kaj funkciado de UEA. La estraranoj decidis unuope kontribui al la tiutema diskuto en la komitata retlisto. Ili trovis siajn vidpunktojn proksimaj inter si sed ne facile resumeblaj en komuna estrara opiniesprimo, ĉar la raporto venis mallonge antaŭ la kunsido. Tial ili konkludis, ke en la komitata listo ili povos plej utile prezenti siajn vidpunktojn kaj evidentigi la komunecon de siaj pensoj. La Estraro ricevis ankaŭ raporton pri la progreso de la renovigo de la ĉefa retejo de UEA, www.uea.org. Kun ĝojo oni notis la ĝisdatigon de la retejo www.esperanto.net.

Tiu retejo de UEA informas pri Esperanto por la ekstera mondo en 62 lingvoj. Tre populara fariĝis la paĝo de UEA en Facebook, kiu havas jam preskaŭ 2200 amikojn. Ĝis nun ĝin prizorgis la Centra Oficejo, kiu tamen esperas, ke ankaŭ estraranoj kaj komitatanoj pli aktive afiŝos en ĝi. Pri la vigla agado de UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj informas la nova retejo

<http://www.esperanto-un.org> kaj speciale pri la agado por lingvaj rajtoj la retejo

<http://www.lingvaj-rajtoj.org>.

Kvankam pasintjare UEA perdis multajn membrojn, la spezkonto de 2010 estas ekvilibra jam por la 5-a sinsekva jaro. La ĝisnuna evoluo indikas, ke la enspezoj kovros la elspezojn ankaŭ ĉi-jare. Pli problema povos esti la jaro 2012. Propono pri buĝeto por tiu jaro ankoraŭ ne pretas pro la malsano de la ĝenerala direktoro, sed la Estraro fidas, ke ankaŭ ĝi estos ekvilibra kun konservo de la nuna laborforto de la CO. La Estraro aprobis ankaŭ du subvenciojn el la ĉi-jaraj rimedoj: 2500 EUR al ILEI kaj 700 EUR al Eŭropa Esperanto-Unio por agado ĉe la septembra Ekonomia Forumo en la pola Krynica.

Jam antaŭe la Estraro elektis komisionojn kaj komisiitojn por multaj taskoj kaj laborkampoj. Al ili aldoniĝis Informa Komisiono, kiu konsistas el Marek Blahuš (Ĉeĥio), Andrej Grigorjevskij (Rusio) kaj Francesco Maurelli (Italio/Britio), kaj komisiito por rilatoj kun Interna cia Normiga Organizaĵo ISO kaj la termi nologia informejo Infoterm, por kiu tasko oni elektis Mélanie Maradan (Svislando). En la Amerika Komisiono Alberto Calienes (Kubo) fariĝis kunordiganto anstataŭ Rubén Diaconu (Argentino).

En la dua tago de la kunsido de la Estraro de UEA ankaŭ tiu de ILEI komencis tritagan kunsidon en la Centra Oficejo. La samtempa ĉeesto de ambaŭ estraroj donis utilan okazon por interkonsiliĝi pri komunaj temoj. Post la fino de la kunsido de la Estraro de UEA, Claude Nourmont, estrarano pri edukado, partoprenis kiel observanto la kunsidon de la ILEI-estraro.

Gazetaraj Komunikoj de UEA, n-ro 110

Tertremo-cunamo en Japanio (11/3/2011)

Samideano HORI Jasuo raportas kiel ili travivis post la malĝoja situacio. <horizonto@water.sannet.ne.jp>

Unua informo. La 14-an de marto 2011

Mi ellitiĝis je la 7a horo. Televido raportis, ke okazas kaoso en ĉiuj stacidomoj, ĉar la elektro kompanio Tokio estis anoncinta malmultigon de elektro-liverado lastan vesperon kaj laŭ tiu anonco trajnkompanioj malmultigis aŭ ĉesis la servojn. Homoj ne estis sufiĉe informitaj pri tio kaj ĉe la stacidomo unuan fojon sciis la situacion. Ankaŭ en mia gubernio (100 kilometrojn fore de Tokio) oni ĉesis ĉiujn trajnservojn. Eble pro tiu influo lakto ne estis liverita al mia hejmo.

Je 7:16, je 10:02, je 12:10, je 3:12 kaj je 3:52 okazis tertremoj, iuj okazis laŭ la maro, iuj okazis en la montaro. Ŝajnas al mi, ke la tuta japana insularo eltenas doloregon post la granda operacio, nome la grandeza tertremo.

Kio okazis al la nuklea centralo? Troviĝas 4 malnovaj nukleaj fornoj. La kovrila domo de la unua forno jam malaperis pro la hidrogena eksplodo. Nun la tria forno estis en la sama stato. Oni enverŝas marakvon por malvarmigi la fornon, sed ial ne sukcesas plenigi la ujon per akvo. Laŭ la klarigo de sciencistoj, la nivelo de la kvanto de disĵetita radioaktiveco estas malalta jene: 1000 mikro-Sievert: la kvanto da radioaktiveco, en kiu homoj povas vivi unu jaron senprobleme. 1557 mikro-Sievert: la kvanto, kiun la unua forno de Hukuŝima disĵetis ĉi-foje. 2400 mikro-Sievert: la kvanto, kiun homoj estas nature eksponataj dum unu jaro. 4000 mikro-Sievert: la kvanto, kiun homoj ricevas dum la radiografiado.

100000 mikro-Sievert: homoj suferas pro akuta radioaktiva malsano kiel vomado.

200000 mikro-Sievert: homoj povas morti.

Je 11:01 eksplodo okazis en la kovrila domo de la tria forno kaj la forno nudiĝis. La registaro ordonis, ke homoj en la radiuso de 20 kilometroj de la centralo sin fermu en la domo. Por gardi sin kontraŭ radioaktiveco oni devas kovri la buŝon per masko, demeti vestaĵojn antaŭ ol eniri domon kaj eviti manĝi malpurigitajn manĝaĵojn. Tio estas tre simpla kaj primitiva same kiel eviti polenalerĝion aŭ gripo!



Mi rememoras la vortojn de jam forpasinta d-ro Takagi Ĵinzaburoo, sciencisto pri nukleo kaj aktivisto kontraŭ nukleaj centraloj, kiujn li diris al mi, kiam mi ekiros al la UK en Varsovio en 1987. Li rekomendis, ke mi ne iru al Pollando, ĉar tie estas plena de radioaktiveco el Ĉernobil. Li aldonis, ke se mi iros, mi aĉetu ĉokoladon por li, ĉar en ĉokolado multe akumuliĝas radioaktiveco kaj per ĝi li povos analizi la situacion. Malgraŭ lia rekomendo mi partoprenis en la UK, do mi kaj aliaj 6000 partoprenantoj jam sufiĉe enspiris bongustan radioaktivecon tiutempe. Sed mi vivas ĝis nun, do ni ne timu radioaktivecon, des malpli la malmulte da kvanto elĵetita el tiu forno! Krome la registaro garantias al ni la sekurecon, klarigante, ke oni ne trovis ion nenormalan en la aero elĵetita el tiuj fornoj. KREDU ĜIN, la popolanoj!

Vespere ni kuris al la najbara vendejo por aĉeti kandelon, ĉar la electra kompanio Tokio anoncis, ke ĝi povos haltigi liveradon de elektro en mia urbo de la 17a ĝis la 19a. En la vendejo jam preskaŭ elĉerpiĝis kandeloj kaj poŝlampoj, kaj mi povis aĉeti nur iom da vaksaj kandeloj. Tamen tio tute ne gravas, ĉar mi kaj mia edzino plurfoje vojaĝis al Nepalo, kie regule kaj ofte okazas paneo de elektro kaj ni jam spertis multajn senlumajn noktojn. Tamen feliĉe mia urbo estis ial ekskludata kaj ni havis luman vesperon.

Laŭ Televido jen estas la nuna situacio pri la urboj kaj vilaĝoj damaĝitaj de la tertremo, pri la socio kaj pri ekonomio: Mortintoj: 1834; Malaperintoj: 15000; Rifuĝintoj: 450000

Inter tiuj rifuĝintoj estas multaj malfortuloj. Ili vivas sen sufiĉe da manĝaĵoj kaj akvo en malumo kaj en malespero. Ili estas bonŝance savitaj, sed atendas ilin manko de ĉiutagaĵoj, poste certe gripo kaj pli poste senlaboreco. Pro la damaĝoj kaj manko de elektro ne funkcias aŭtomobil-kompanioj Toyota, Isuzu kaj aliaj, elektro-kompanioj Hitaĉi,

NEC kaj Fujicu, kaj kelkaj magazenegoj de Micukoŝi, Takaŝimaja kaj aliaj. Japanaj akcioj estas vendataj kaj nur en mateno la prezo malaltiĝis je pli ol 500 enoj.

En Japanio troviĝas ĉirkaŭ 60 nukleaj fornoj. La konstruadojn iniciatis tiama Liberala Demokratia Partio, la kapitalista mondo kaj elektro-kompanioj, ĉiam mensoge insistante la sekurecon kaj frapante la vangojn de kontraŭantoj per faskoj da bank-biletoj. Japanio estas vulkana lando kaj situas sur la granda nesto de tertremoj, do estas tute klare, ke konstrui nukleajn centralojn en tiu insularo estas danĝerege, sed mono regas la mondon. Por profiti, ili faras ĉion, kaj la rezulto venis hodiaŭ.

Mi longe opinias, ke Japanio ekspluatu sun-energiecon anstataŭ atom-energieco.

Japanio havas sufiĉe altan teknologion por tio, kaj se ni sukcesos tion, ni povos gvidi la tutan mondon en tiu kampo. Tamen la industria mondo ne havis tiun perspektivon kaj direktis sin al mono, kiu vidiĝis ĝuste antaŭ iliaj okuloj. Mi deziras, ke Japanio nuligu ĉiujn nukleajn centralojn kaj direktu sin al pli sana energio. Dume ni havos malfacilon, sed tiu direkto vere garantios feliĉon al ĉiuj popoloj kaj al la mondo.

Fine mi dankas al la mondo, kiu sendas savotrupojn kaj proponas la helpon al Japanio. Ĝis nun helpas nin trupoj el Koreio, Singapuro, Meksiko, Ĉinio, Germanio, Usono, Svislando, Novzelandio, Aŭstralio, Tajvano, Britio, baldaŭ Francio kaj Rusio.

Dua informo. La 16-an de marto 2011

Hodiaŭ matene finfine mi ricevis retmesaĝon de s-ro Teduka, kiu loĝas en la urbo Tagajoo atakita de la cunamo. Li skribis jene: “Mi fartas bone. Mia domo ne estas difektita per la tertremo, sed diversaj servoj ankoraŭ ne funkcias. Mankas benzino, do mi decidis ne uzi aŭtomobilon. Ĝis hieraŭ mi vidis flamegojn kaj fumojn el la benzin-rezervejo. Sur la stratoj ne foraj de mia hejmo estas tie kaj ĉi tie disĵetitaj multaj aŭtomobiloj kaj grandaj ŝarĝaŭtoj transportitaj per la cunamo”. Hodiaŭ matene en mia gubernio multe ventis. En la Toohoku-regiono multe neĝis! Kiel malvarme kaj solece ili pasigis la nokton! Mi ne povis ne plori. Hodiaŭ vespere ni planis havi estraran kunsidon de Kantoo-Esperanto-Ligo en Tokio, sed ni nuligis ĝin, ĉar la trafika servo ne estas normala. Jam multaj kunvenoj estas simile nuligitaj: La 12an kaj la 13an en mia gubernio okazus la tutlanda edukada kunveno, en kiu mi partoprenus, sed oni

nuligis ĝin. Tutlandaj kaj internaciaj konkursoj de teniso, golfo, maratono, skiado ktp., kiuj okazus en la lasta semajnfino, estis nuligitaj. Baldaŭ komenciĝos la profesia basbalkonkurso ĝis aŭtuno, sed ĉar unu teamo havas sian bazon en la urbo Sendai trafita de la tragedio kaj ĝia basbalejo estis difektita, oni decidis prokrastigi la komenciĝon. En la venonta semajno komenciĝos Tutlanda basbal-ĉampioneco inter superaj mezlernejoj, kaj la okazigon aŭ prokrastigon oni decidis baldaŭ. Partopreni en ĝi kiel reprezentantoj el la gubernioj estas granda revo kaj honoro de lernantaj basbalistoj, tial se oni nuligus la okazigon, tio estus granda ŝoko kaj malespero por tiuj. Marto estas monato por kursofinaj ceremonioj, sed oni ne povas okazigi tiun ceremonion en multaj urboj. En televido mi foje vidas jam preparitajn ornamojn por tiu ceremonio en la granda salono de lernejo, kiun oni nun uzas kiel rifuĝejon. Laŭ ĵurnalo *Asahi*, en mezlernejo en la urbo Kurihara, oni okazigis la ceremonion. Tiuj kursofinantoj jam en 2008 spertis grandan tertremon, kaj ĉi-foje denove tiun tragedion. Sugaŭara Ŝun, unu el la kursofinantoj, diris kun larmoj: “Mi pensis, ke ni ne havos la ceremonion. Ĉiuj suferas multe, do des pli kuraĝe mi paŝos antaŭen kun espero”. Kaj samtempe tiuj nuligoj donas grandan damaĝon al la ekonomio. En februaro nove ekfunkciis Ŝinkansen (rapida trajno) de Tokio al la urbo Aomori situanta ĉe la pinto de la Honŝuu-insulo, sed nun pro la tertremo tiu linio ne funkcias. Oni multe atendis turistojn, precipe en la sezono de sakuro, sed multaj homoj ne emas vojaĝi en tia malĝoja etoso. Certe sekvos bankrotoj de hoteloj kaj maldungoj. Damaĝo de la tertremo estos ne kalkuleble granda por nia ekonomio. Kiel oni traktas kadavrojn? En Japanio nuntempe preskaŭ ĉiuj mortintoj estas kremaciitaj, sed en tiu ĉi kriza situacio tio ne eblas, tial la ministro de bonfarto decidis specialan regulon, por ke oni povu enterigi tiujn mortintojn sen permeso de la urba aŭ vilaĝa estro, sed nur kun mortatesto de kuracisto. Kiam oni ne povos identigi kadavron, oni fotos ĝin, konservas ĝiajn harojn kaj enterigos ĝin. Estas malĝoje, ke multaj homoj finas sian vivon tiamaniere.

Temas pri la reaktoroj, la situacio estas preskaŭ sama kiel hieraŭ. Oni planis malvarmigi la reaktorojn, ĵetante akvon el helikopteroj, sed anticipa mezurado de radioaktiveco sur tiuj trovis ĝin tro forta, ke oni ĉesis plenumi tiun projekton. Laŭ la veterprognozo ankaŭ morgaŭ estos tre malvarme kaj neĝos en la norda regiono.-

ANONCOJ

Nia celo

La ĉefaj celoj por eldoni
SEK-Bulteno estas:

Unue informi pri Esperanto kaj
nia regiono al neesperantista
publiko. **Due** informi pri kelkaj
E-aktivaĵoj al esperantistoj.
Tio estas la kialo de la plimulta
hispanlingva materialo.

SEK-Bulteno en la reto

Nia bulteno estas dissendita al
pli ol 500 retaj adresoj de espe-
rantistoj en 32 landoj.

Tamen ĝi ankaŭ estas legebla
kaj elŝutebla ĉe:

www.gazetejo.org

Dank' la ĝentileco de bonaera
samideano Carlos Devizia, kiu
volonte helpas ĝian enretigon, nia
bulteno estas trovebla ĉe la ttt-ejo
Gazetejo.

Dankesprimoj

Pro siaj monkontribuoj SEK
kore dankas al ĝiaj membroj kaj
simpatiantoj.

Se ankaŭ vi deziras kontribui
Bv. kontaktu la Redaktejon.

Atenton!

Se vi ŝanĝis vian poŝtan
adreson aŭ ret-adreson bv sciigi
al nia Redakcio. Antaŭdankon.

Distribución

SEK-Bulteno, *Boletín Informa-
tivo del Club Saenzpeñense de
Esperanto*, se edita y difunde con
la colaboración voluntaria de sus
miembros y simpatizantes.

Se distribuye gratuitamente.

SEK-Bulteno N° 31; Mayo-Junio 2011 [2]

Órgano Oficial del Club Saenzpeñense de Esperanto

Calles 119 y 122, H3700FTT Pres. R. Sáenz Peña, Chaco, Argentina

Redacción: Rubén T. Diaconu Tkachenco, E-mail: rubendiaconu@yahoo.com.ar

Miembro y Delegado local de UEA (*Universala Esperanto-Asocio*), Holanda

Colaboradores: Tony Stacul (Chaco); Emmanuel Maggiori (Buenos Aires)



Sr/ra: